

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str. P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
- Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

No 84 (Seventh Year)

Melburno (Melbourne), Aŭstralio.

10 junio 1927

LIBRO EN ESPERANTO PRI AŬSTRALIO.

La firmo Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, anoncas baldaŭan aperon de libro "Aŭstralio: Lando kaj Popolo." Ĉi tiu ĉi geografia verko enhavas ĝeneralan priskribon de nia lando kaj estas kredeble unika per tio, ke ĝi prezentas Aŭstralion de du vidpunktoj de eksterlandana kaj de enlandana. La verkintoj estas Laŭri Laiho, (Finno), kaj Delsudo, (A. Maurice Hyde, Aŭstraliano.)

THE CURSE OF BABEL.

Under the title "Babel est-elle encore maudite?" (Does the curse of Babel still hold good?) the Revue de Univers in Paris has published an interesting pamphlet from the pen of Raymond Julliard. In an excellent style and in a convincing manner the author shows that Esperanto is steadily advancing, and that neither the inertia of the masses nor the opinions of slow-sighted or sceptical opponents can arrest its progress. The book also contains extracts from replies by eminent persons in France to questions addressed to them on the subject of Esperanto. Finally, M. Charles Richet, of the Institute in a preface, once more declares himself an enthusiastic adherent of Esperanto, which he describes as "a beautiful and luminous reality."

—I.E.S.

ESPERANTISTS ISSUE BANK NOTES.

The little town of Laren, in Holland, is the place of origin of a new kind of paper money (says the New York "Times"), which Drevess Uitterdijk, the Dutch champion of Esperanto as a world language, feels confident will soon take its place among the recognised currencies of the world of trade. Agitation for the commercial use of Esperanto has long stirred discussion.

The unit of the Esperantist currency is the Spesmilo, of a value of about 50 cents in American money, and it is being issued by the Universala Spesmila Banko of Laren, which is trying to raise 20 000 Spesmiloj in real money for the purpose of starting the formation of a company with a capital of 100 000 Spesmiloj.

As recently explained by a writer in Het Volk of Amsterdam, the Esperantist bank is to keep one-quarter of its paid-in capital on deposit with a sound Dutch bank and is to maintain a covering of 40 per cent. in gold, silver, national currencies, etc., for its notes. The other 60 per cent. of the capital may be used for investments and safe business transactions.

At first it is expected that the Spesmiloj will be used by Esperantist publishing houses and in other international trading in books, etc., and that eventually they will become

recognised by even non-Esperantists as filling the need for an international currency not subject to fluctuations and exchange losses.

The notes carry a picture of The Hague Peace Palace on one side and on the other the head of Dr. Zamenhof, inventor of Esperanto, and the denomination.

"Evening News," 12/5/27.

A COMMON TONGUE

To Unite the World

The presence of the Czecho-Slovakian Soccer team in Sydney has again demonstrated that while they are all good fellows and true "sports," language difficulty bars friendly conversation," writes Mr. F. T. Simon, president of the Sydney Esperanto Society.

"This has induced your 'Man About Town' to comment on 'the necessity of a universal language,' stating that it would be a boon even if only for social purposes.

"The fact is that never before has the need been more pronounced than at present. Not merely in sport alone, but in every walk of life, could such a language be used. And it is being used, for Esperanto has proved itself an efficient medium in all parts of the world.

Study Widespread.

"The only difference is that Esperanto does not aspire to be a "universal" language, but simply an "international auxiliary" medium. Its study in Europe is widespread, which, I am sure, can be proved by the Czecho-Slovakians.

"Shortly, we are to have broadcasts relayed in Australia from Continental stations. Each will speak in their own tongue, and for matters of comparison it will certainly be interesting. But is not the need for an international language apparent once more?

"It would certainly be to the advantage of the Australian public to take a greater interest in Esperanto, otherwise they will be left far behind."

—"Evening News," 28/5/27.

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.K. — Dum la monato, nova membro, s-ro Alexander Jamieson, alparoladis la anojn de Sydney Esperanto-Societo pri "Interkomunikado — Antikva kaj Moderna." Kiel entuziasma radio-amatoro la parolanto povis profundigi en la temo kaj traktis ĝin de la komenco kun kurierportantoj ĝis hodiaŭa radia stadio.

Ĉe tiu kunveno ni havis la plezuron bonvenigi f-inon V. Cox, sekretariino de la Melburna Esperanto-Societo.

S-ro Edgar A. Pryke, unu el la aŭstraliaj Esperanto-pioniroj, tre interesis membrojn kun parolado titolitan "Legendoj el Malproksima Oriento." Fluparole li montris per ideale elektitaj ekzemploj la similecon inter orientaj kaj okcidentaj fabeloj. Abundas bravaj princoj, belegaj principinoj, malriĉuloj kun honestaj, laboremaj gepatroj, strangaj animaloj, feinoj, kaj mirakloj, samkiel en tiuj de Grimm, Andersen, kaj aliaj bonkonataj verkoj. Tamen, naciaj kutimoj traperetras, ebligante ioman studadon de la popola moraleco kaj vivmaniero. La aŭdantaro vigle aplaudis la parolanton je la fino.

Monata dancado denove okazis kaj estis decidita doni la enspezojn de proksima amuzaĵo al U.E.A. Genevo. Oni atentigas pri la ĉi-tie okazonta jarkunveno je la 30a junio. Vizitantoj estas invitataj.

MELBURNO. V. — Dum la pasintaj unu du monatoj, troviĝis en la programo de la Melburna Esperanto Societo, kelke da tre interesaj paroladoj pri diversaj temoj. S-ro Hudson donis pluan kaj pli detalan rakonton pri multaj interesaj aferoj en tiu malnova, kaj vasta kontinento, Afriko.

Alia parolado, tute malsama, sed egale interesa alimaniere, estis donita de s-ro Grant, kiu priskribis la vivmanieron kaj morojn de diversaj fiŝoj.

La lando de la fama poeto, Robert Burns, estis laŭdata per kantoj kaj priskribo, de entuziasma samlandano, s-ro Skurrie, kiu parolis al tre interesataj aŭskultantoj.

Antaŭ nelonge denove okazis ekskurso por tiuj, kiuj ŝatas la marsadon, sed bedaŭrinde la vetero ne estis bona, kaj iom malpligrigis la sukceson de la promeno.

Tre plaĉis al Esperantaj aŭskultantoj de 3LO, aŭdi pri progreso de la internacia lingvo in Ĥinujo, kiun raportis d-ro Williams, kiu antaŭ ne longe revenis de tiu lando. S-ro Pyke ankau brodkastis pri Esperanto, antaŭ ol li ekiris por ĉeesti la proksiman mondkongreson.

Ĉe la kunveno de la Melburna Esperanto-Societo, 323-325 strato Bourke, kvina etaĝo, okazos danco, je la 17 junio, 8a vespere. Ĉiu samideano estas kore invitata. Veni kaj venigu viajn amikojn.

HOBART ESPERANTO GROUP.—Members of the above Group have been greatly pleased to receive another visit from our ardent samideano (Dr. F. J. Williams) who has been on a brief visit to Hobart in connection with his Missionary work.

On May 23rd some of the members met at the house of the President (Miss Hammaford) where a very pleasant evening was spent. Dr. Williams kindly brought a number of photos of scenes in China which were much enjoyed, and gave a very interesting outline of the state of things in China. He also spoke of the encouraging extent to which Esperanto is being taught in various parts of that country. The doctor as usual has seized every opportunity for propaganda work while in Hobart, among which was a talk from the Hobart Radio Station on an Esperantist's experiences in China, which will extend a knowledge of the movement in Tasmania. Members joined in wishing Dr. Williams a pleasant journey back to the mainland, the only regret being that his time was too fully occupied to allow of his again visiting the Group.

AUCKLAND, Nova Zelando.—Societa kunveno okazis 11an aprilo. Es-tis decidite skribi al s-ro King, A.E.A. Kongressekretario, petante lin enpagu la societan donacon, kio konsistas el dek ŝilingoj, al "La Suda Kruco" kiel la kotizojn al la gazeto.

Dum aprilo du Esperantistoj foriris—unu al Skotlando (Sro E. H. Lawton) kaj alia al edzeĉaj vicoj (Sro M. J. Ravelich). Bonvojaĝon al la antaŭa; bondeziroj kaj gratuloj de la Aucklanda Esperantistaro etendiĝas al la geedziĝintoj.

Kunveno de la Societo okazis 14an marto. Post fino de negocaj aferoj ĝenerala diskuto rilate la elparolon de la vokaloj "a" kaj "e" audiĝis. Ĉiame restas malsamaj opinioj pri la korekta maniero per kiu oni devus elparoli la sonojn. La prezidanto faris referencon al ses diversaj libroj, kiuj klarigis malsame. La diskuto estis intereso-plena, precipe ĉar la temo estis traktata dum la lasta vizito de s-ro King el Wellington, kiu parolante la lingvon uzas mallongajn vokalojn. La kunveno estis konkludita per lego kaj tradukado de la libro "La Kamena Angulo."

CAMBRIDGE, N.Z.—La Somera Lernejo por Instruistoj okazigita ĉe Cambridge, (N.Z.) dum januaro estis bonega kampo por dissemado de nia lingvo, kaj frapante la okazon, s-ro Instruisto C. J. Adcock, Del. de U.E.A., liveris lecion pri Esperanto al la instruista geĉeestantaro. Tag-jurnaloj priskribis la lecion intereso-plena kaj instrua; kaj longa kaj plena raporto aperis. Sen ia dubo, s-ro Adcock, kiu pritraktis admirinde la temon laŭ la diversaj avenuoj de disvastigo kaj progreso, faris unu el la plej gravaj paŝoj ĝisnune videblaj en N.Z. La oportuno por paroli al ĝeinstruistoj pri Esperanto ne sin prezentigas ĉiun semajnon. La rezultatoj jam montriĝis ĉar s-ro Adcock raportas ke kelkaj instruistoj komencis lerni Esperanton, kia afero estas bonega per tio ke la varbado de personoj de la instruista profesio portas netakceblajn sekvojn. Tia lekcio estas la unua en Nova Zelando. Pro tio kaj pro la sukcesego atingita gratulojn al s-ro Adcock!

WELLINGTON, N.Z.—Dum Marto troviĝis ĉi-tie la mondiranta ciklisto el Riga nomita Kotulski. Ĉar raporto aperis en la februara numero de Suda Kruco sciigante ke s-ro Kotulski parolis kontraŭ Esperanto dum restado en Sydney la Delegito kaj Vicedel. de U.E.A. intervjuis la cikliston, kiu refutis tute la gazetraporton ke li, antaŭ ol komencante sian vojaĝon, lernis Esperanton kaj nun ne uzas ĝin sed kontraŭe uzas nur la Anglan lingvon. Kiam s-ro Kotulski alvenis Wellington-n li ne povis paroli Esperante, kaj nur malbone Angle, sed la Deligito posedis Esperanto-francan lerno-libron per kio la ruso, kiu scip-

ovas rusan, francan, germanan, k.a. lingvojn, bone kaj rapide lernis Esperanton. S-ro Kotulski aliĝis al U.E.A. kaj uzos Esperanton dum la cetero da sia vojaĝo ciklo tra Suda Ameriko, ankaŭ en Usono kaj Britujo, en kiuj landoj povas interparoli li nur malbone. Estas videble ke la Sydney Jurnalistaro uzis la rusan kiel instrumenton kontraŭ Esperanto, kaj farante tion kredeble trompis multajn Sydneyanojn.

WHANGAREI, N.Z.— Pastro s-ro Woolloxall paroladis pri la temo "Esperanto" al la membroj ĉe la ĉiusemajna lunĉo de la loka Rotaria Klubo. Inter alia li instigis Rotarianojn studi la temon kaj subtenadi la movadon. Post la parolado la klubanoj donis koregan dankesprimon al la parolinto. La du lokaj taggazetoj dediĉis multe da spaco al detala raporto pri la afero.

S-ro D. Tilly, D.B.E.A., akceptis la postenon de N.Z. sekretario de la Internacia Policista Ligo (ĉe Wein).

DUNEDIN, N.Z.— La gazeto, "Otago Witness" akceptis bonegan artikolon pri la progreso de Esperanto. La artikolo, kiu aperis je 26a aprilo, estis verkita de la kapabla plumo de f-ino E. Hodgkinson, kiu priskribis la temon er tre aloga kaj admirinda maniero. Tia artikolo varigos geamikojn al nia movado!

HOBART CONGRESS COMMITTEE HELPS "LA SUDA KRUCO."

When it was hoped a Congress would be held at Hobart during Easter last the committee advertised in this gazette. They paid for the publicity and we were not entitled to look or hope for anything more. However, on winding up their accounts the committee found themselves with £2/5/- in hand and this has most generously been handed to "La Suda KrucO." We share with Mr. Guilbert and his fellow workers their disappointment at the failure of the Congress to materialise this year and still hope that Hobart will one day welcome visiting Esperantists to a Congress. The money sent is equal to a gain of nearly a dozen subscribers for a year and we express our warmest thanks and appreciation of the donation and the kind feelings towards us which prompted it.

LA UNUAJ EŬROPAJ LOGANTOJ EN AŬSTRALIO.

Verŝajne la unuaj Eŭropanoj, kiuj celis trovi konstantan loĝejon en Aŭstralio estis du Holandaj ŝipanoj, kiujn, en Novembro de la jaro 1629a, ilia ŝipestro, komandanto Francois Pelsaert, pune forlasis sur la marbordo de Okcidenta Aŭstralio proksime al la sido de la nuna Geraldton.

La ŝipo "Batavia" de Pelsaert estis unu el aro de komercaj ŝipoj, kiuj, proksime al la fino de la jaro 1628a, ekveturis de Holando al la insuloj sudokcidente de Azio. En Junio en la sekvinta jaro, dum la veturado trans Hinduĵan Oceanon, ventego disigis la ŝipon "Batavia" for de ĝiaj kunŝipoj. Blovite tre suden for de la ĝusta veturvojo, ĝi rompiĝis sur la danĝerplenaj rifoj, ĉirkaŭantaj la insuleton "Houtman's Abrolhos," la plej suda koralformaĵo en la mondo. La pasaĝeroj kaj ŝipanoj en la nombro de ĉirkaŭ tricent personoj surbordigis sur du-tri insuletojn de Houtman's Abrolhos, sed pro la rapideco de la deŝipiĝo, ili, prenante provizon da manĝaĵoj, malforgis porti kun si sufiĉon da akvo. Ne trovante naturan fonton de akvo, provizo sur la nuda rckaro, kiu estis ilia rifuĝejo, ili sekve estis en tre granda danĝero de morto de soifo. Pro la ekstrema graveco de la pozicio, la ŝipestro, prenante kun si kelkon el la ŝipanoj, ekveturis en la pinaso apartenanta al la ŝipo, por serĉi la nemalhaveblan fluidon sur la ĉeftero, pri kiu oni sciis, ke ĝi ne estas malproksima. Ili sukcesis atingi la ĉefteron kaj tie surbordigi. Malfeliĉe ili trovis nuda senvegetaĵa la apudmaran teron, kaj, malesperinte akiri sufiĉan provizon da akvo, ili ekveturis al Batavio por helpo. Dume la homoj lasitaj sur la insuletoj estis feliĉaj en tia mezuro, ke ili trovis akvokavon, pri kiu ili unue supozis, ke inter ĝi kaj la maro estis subtera fluejo, ĉar ĝia akvo leviĝadis kaj malleviĝadis kun la tajdo. Tamen ĝi enhavis trinkitaŭgan akvon. Liberigita el sia maltrankvilo pri tio, ili devis fronti ankoraŭ unu gravan, tujan danĝeron pro la konduto de iuj el sia anaro. En la frua parto de la veturado de la malfeliĉa "Batavia," la ŝarĝzorgisto, Jerome Cornelis, kaj iuj el la pli sendisciplinaj ŝipanoj komplotis ribeli, ŝteli la ŝipon kaj

fariĝi korsaroj. Ial ili ne tiam plenumis la projekton, sed jam nun pro tio, ke Pelsaert forestis kaj la ŝipanoj kaj pasaĝeroj, inkluzive de kelkaj virinoj kaj infanoj, estis limiĝintaj per la malvasta spaco de la marzonita insuletaro Houtman's Abrolhos, la kanajlo Cornelis kaj liaj samideanoj denove konspiris kaj celis fari sin estroj de la situacio. Ili perforte ekposedis la rompitan ŝipon, buĉis tridek-kvardek el tiuj, kiuj rezistis ilin kaj kaptis la virinojn. Ili intencis kapti la ŝipon, kiun eble Pelsaert venigos de Batavio por savi ilin, kaj tiam komenci piratecan karieron sur la apudaj maroj. Tamen malgraŭ ilia estrado de la ruirigita ŝipo kaj du el la insuletoj, kie devis resti la rifuĝintoj, la homoj sur la tria insuleto sukcese kontraŭstaris iliajn atakojn, kaj kiam Pelsaert returne alvenis la insuletaron en la fregato "Sardam," oni arestis kaj enkatenis la konspirintojn. La plimulton el la arestitoj oni senprekraste ekzekutis, sed ial lasis vivi du el ili nomitajn Loos kaj de By. Al tiuj oni donis malgrandan boaton kaj provizon da manĝaĵoj kaj lasis al ili la duban eblon de vivado sur la dezerta marbordo de nekonata lando prilogata de sovaĝuloj.

Kvankam Tasman, veturonte en la jaro 1644a ricevis ordonon kiel eble sciigi pri la forlasitaj, tamen verŝajne oni neniam akiris pluan informon pri tiuj nevolanta logiĝintoj en Aŭstralio. Oni nur povas supozi, ke

se ili sukcesis amike interrilati kun la indiĝenoj, eble ili parte estis la kaŭzo de la enmikso de la sango de blanka raso en tiun de Aŭstraliaj nigroloj. Post ducent jaroj Sir George Grey rimarkis tian mikson inter la indiĝenoj de Nord-Okcidenta Aŭstralio.—C. Smith, en "The Age," Melbourne.

El la Angla lingvo tradukis Geo. Gordon, F.B.E.A.

LAST MONTH'S SUPPLEMENT.

In compliance with a request we last month circulated a pamphlet entitled "La Edukado de la Infanoj pri Pacaj Principoj." Our issue was made up when the pamphlets came to hand and as we wished to avoid delay they were sent out without special reference to them elsewhere. They were not distributed merely as a service for a price, but because they had a theme that no one could take exception to; and as the publishing Society had helped Esperanto it was only right that Esperanto should help them. Moreover, we think that every additional use that is made of Esperanto brings the day of universal use much nearer. It is regretted that some errors appear in the "setting," but they are not such as would obscure the meaning or should debar it from circulation.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per posto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE MELBOURNE

THE READING OF ESPERANTO LITERATURE

is essential in order to obtain clear expression and good style.
WE HAVE AN EXTENSIVE STOCK OF THE LATEST LITERATURE
BY THE BEST AUTHORS.

Pro Iŝtar (Luyken), La Faraono (Kabe), Karmen (Merimee), Lilio (Synotte), The Complete Bible.

Send stamp for full price list. Include postage when ordering, 1d. for each 1/-.

MELBOURNE ESPERANTO SOCIETY, Box 731f, ELIZABETH ST. P.O.,
MELBOURNE.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata amiko,

Argumentis inter si dum multaj jaroj tiuj, kiuj studas la Aŭstraliajn indiĝenajn bestojn, pri la naskiĝo de la kanguruo. Tiu ĉi demando nun estas solvita per la eldono de verko de Le Souef, Burrell kaj Troughton. Profesoro J. A. Thomson skribante leteron al la 'Empire Review,' diras, ke li taksis la valoron de tiu ĉi verko, laŭ la informodona priskribo de la iro de la novenaskita kanguruo en la poŝon de la patrino, kio estas temo pri kiu eĉ Aŭstralianoj iafaje skribis sensencaĵojn.

La patrino portas la idon dum 39 tagoj antaŭ naskiĝo. Kiam naskita la kanguruo estas ĉirkaŭ unu colon longa, kaj ne nur ĝi estas blinda kaj senhara sed ĝi ankaŭ estas tiel nematura, ke ĝi ne povas mamsuĉi. Ĝiaj antaŭaj membroj kaj kapo estas senproporcie grandaj kaj facilmovaj, kaj la eta ido uzas ilin en sia aventura iro sur la haŭto de la patrino al la ventra poŝo, kiu evoluas ĉirkaŭ la kvar laktglandoj.

Eble la patrino helpas la idon per siaj lipoj, sed estas renia dubo pri la riskplena instinkta vojaĝo, kiu okupas ĉirkaŭ duonhoron. La lavro, kie oni povas nomi ĝin, sin movas inter la haroj kun energiaj penoj de ĝiaj antaŭaj membroj, kaj daŭraj flankaj movoj de ĝia kapo. Iafaje ĝi perdas la vojon por iom de tempo. Kiam ĝi atingas la poŝon, kaj tŭsas unu el la mampintoj, ĝi haltas kaj sin fiksas al ĝi per la buŝo. Ĝi facile malfiksiĝus escepte pro unika adaptaĵo, per kiu la mampinto, unue pinta kaj firma, grandigas en la buŝo de la ido kaj pleniĝas ĝin, tiel ke la ido restas firme fiksita. Tio daŭras dum kvar monatoj. En la frua periodo, se ne por la tutaj kvar monatoj, la eta ido ne povas suĉi, kaj la lakto devas esti perforte enigita en ĝian buŝon, per la kuntiriĝo de speciala muskolo ĉirkaŭ la laktglando. La spirado estas ebligita al ĝi per speciale longigita epigloto gardanta la traheon, kaj longigita kartilago en la laringo. La du kune estas puŝitaj antaŭen en la bazon de la naza aperturo, tiel ke la aero povas pasi de la naztruoj al la pulmoj laŭ longe de portempa senfina traĵo.

Lasta tempe sinjoro Cecil Freer

venis al Melbourne por ĝui libertempon, kaj donis al ĵurnalisto iom da informo pri la bubaloj, kiuj troviĝas ĉe lia bienego en la Nordo Teritorio de Aŭstralio; dum la venonta semajno li revenos al Darwin, kaj el Darwin vojaĝos 100 mejlojn oriente al sia 1000-kvadrata-mejla bienego, kie troviĝas 10,000 bubaloj, kaj 400 ĉevaloj.

Sinjoro Freer estas la plej sperta bubala pafisto en la Teritorio, kaj ĝi estas li kiu starigis la bubalan industrian sur firma bazo. Antaŭ dudek jaroj juna Freer kontraktis sin al advokato en Darwin, kiel lernanto, sed labori en oficejo tedis lin. Li jam antaŭe neniam rajdis ĉevalon, kaj tre malofte uzis pafilon. Tamen li akceptis kontrakton por pafi bubalojn!

En tiuj tagoj ekzistis malsamaj kondiĉoj ol hodiaŭ. Tiam tute mankis bienoj. Rivalaj aroj da ĉasistoj vagis sur la plataĵoj kaj senelekte mortpafis la bubalojn kaj pelis ilin for de la aliaj ĉasistoj.

Oni ankoraŭ mortpafas la bubalojn, sed la vagantaj aroj da ĉasistoj ne plu troviĝas kaj la bubaloj ne estas senelekte mortigitaj. Sinjoro Freer estis la unua homo fordi bienegon en la Teritorio. Li posedas lugron kaj ŝipstacion, kaj li portas la bubal haŭtojn per la lugro 100 mejlojn al Darwin.

Li dungas unu blankrasulon kaj 30 indiĝenojn tra la tuta jaro. Mankas vojo al tiu ĉi bienego pro la multaj marĉaĵoj. Li rajdas al Darwin aŭ veturas tien per la lugro, kaj ricevas poŝtaĵon nur monate.

Unu el la kialoj por lia nuna vizito al Melbourne estis katastrofo rilatanta al virbubalo kaj li mem kaj malbona ĉevalo kaj eksplodita pafilo. Ĉiuj amase falis.

Li ankaŭ venis al Melbourne por peni interesigi la Ministraron de Hejmaj kaj Teritoriaj Aferoj pri lia industrio. Antaŭ nelonge li faris kontrakton, por vendi bubalan viandon al Javo. Sed oni sciigis lin, ke li devas pagi al registara inspektoro 500 funtojn sterlingajn jare, kaj ke la inspektoro devos inspekti la bubalojn antaŭ ol ili estos buĉmortigitaj, kaj ankaŭ stampi la viandon.

La ideo, ke la inspektoro povus inspekti la bubalojn dum kuregado, es-

tas ridinda, tial li forlasis la kontrakton. Miloĵoj da tunoj de viando estas jare malŝparita.

Li eksportas la haŭtojn al la Mediteraneaj landoj, kaj la meza prezo ricevata estas naŭ pecoj por funto. Mez-kvalita haŭto pezas 75 funtojn. Virbubalo havas haŭton kiu, en lokoj estas dika je du koloroj, sed la ledo farita el bubala haŭto estas nur mez-kvalita.

Tute mankas bariloj kaj bestejoj. La bubaloj estas sovaĝaj. La ĉasis-toj per ĉevaloj galope ĉasas kaj mort-pafas la bubalojn. Troviĝas depone-toj ĉe interspacoj en la bienego, kie oni metas la haŭtojn. La bubalaroj estas lokitaj kaj mortpafitaj eble 50 mejlojn for de la bienega hejmo. Via fidele, P. H.

LISTEN IN TO ESPERANTO FROM 3AR, MELBOURNE.

Mr. C. W. Ballard, Chief Delegate of the U.E.A. in Australia and President of the Melbourne Esperanto Society has received a request to talk on Esperanto from the above station. Our readers should watch the radio programmes for the precise date.

NEKROLOGO.

La 17an aprilo radioz. anonco anoncis al ni la morton, ĉe la insuloj Kermadecs lokitaj ĉirkaŭ 600 mejlojn malproksime de Auckland, de s-ro C. H. Parker, bone konata kaj pionira Esperantisto de Nova Zelando.

S-ro Parker energie kaj favore laboradis por Esperanto dum sia mult-jara restado en Auckland. Li gvidis Esperantan kolonon en la gazeto "Auckland Labor News" kaj ageme sin interesis pri Esperanto-kluboj. Subteninto de la Laborista Partio, li kelkfoje aranĝis la reprezentadon de nia lingvo en la procesioj je "Labora Tago."

Je la fino de pasinta jaro s-ro Parker kun du kunuloj foriris Auckland por reiri al sia bieno sur la Kermadecs Insuloj. Ses semajnoj antaŭ ol la morto, dum laborado surbiene, unu el la fingroj vundiĝis, kaj la membro veneniĝis rezultante la morton. En Nova Zelando ne estas parencoj, sed multaj geamikoj de la mortinto troviĝas, kiuj kortuŝite sentas pro li.

Forpasis unu el la plej fidelaj amikoj de Esperanto.

LIBROJ RICEVITAJ.

Ni faras recenzon kiam ni ricevas du kopiojn de iu libro. Kiam la eldonisto sendas nur unu kopio, ni nur mencias la titolon, eldoniston kaj prezon.

Niĉjo Mensogulo, Biblioteko Tutmonda, (de British Esperanto Association), Fajreroj, Adalberto Smit, sm. 0.50.

Bes-a Adresaro 1927, Bohema Esp., Servo. 0.50 Fsv.

Miraklaj Aventuroj de Sinjoro Longkrurulo. Rime vorkita kaj eldonata de Drees Uitterdijk L. K., Hilversum, Holando, kun 152 bildoj kaj 1662 strofoj. Prezo sm. 1.25.

La Vero pri la Suda Tirolo, 1918-1926. Kompilita laŭ fidindaj aktoj kaj aŭtentaj faktoj de Hans Fingeller, Suda Tirolo, Eldonita de la aŭtoro. Kvankam ni ricevis du kopiojn de ĉi tiu libro ni ne volas esprimi opinion pri la enhavo. Kompreneble ĝia enhavo estas politika kaj kvankam ni ĝoje vidas, ke la aŭtoro uzas Esperanton por atingi internacian legantaron, ni lasos la leganton aprobi aŭ malaprobi la enhavon. La broŝuro konsistas el 51 paĝoj la papero estas bona, la presado klara kaj la Esperanto korekta.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, 5 6; Arbeiter-Esperantisten, 1-2, 3; British Esperantist, 264, 265; Bulgara Esperantisto, 8; Brazilia Esperantisto, 9-12; Belgia Esperantisto, 1, 2; Bulteno de la Antverpena Esperanta Komitato, 1, 3; Bulteno de Internacia Scienca Asocio, 6; Der Arbeiter-Esperantist, 3, 4; Esperanto, 319, 320; Esperanto-Anzeiger, 4; Heroldo de Esperanto, 6 ĝis 14; Holanda Esperanto-Pioniro, 17, 18, 19; Informservo de la Internacia Labora Oficejo, 28 ĝis 38; Internacia Esperanto-Servo, 14; International Language, March, April; Internacia Medicina Revuo, 2; Kolektanto, 6; La Suno Hispana, 116, 117, 118; La Lernanto, 45, 46; La Revuo Oriento, 2, 3, 4; Libera Laboristo, 2, 3; La Progreso, 1-2, 3; Oomoto, 26; Pedagogia Revuo, 2-3, 4; Pola Esperantisto, 2, 3; Pacifika Espero, 21-22; Svenska Arbetar-Esperantisten, 2, 3; Svenska-Tidningen, La Espero, 1, 2, 3; Verda Stelo, 3; Verda Mondo, 3.

UNIVERSALA ESPERANTISTA PACIFISTA LIGO.

Lasta Alvoka!

Dum du jaroj ni klopodadas starigi fortan pacifistan ligon; ni alvokis en la Esperanto-gazetaro, ni skribis al la Naciaj Societoj, ni korespondadis kun interesuloj,—sed ĝis nun nur en unu lando (Ĉeĥoslovakujo), la pacifistoj energie kaj frukt-plene laboras.

En nia lasta cirkulero, ni klare montris nian celon: “unuigi per Esperanto ĉiujn direktojn en la pacmovado, por formi unu grandan internacian forton por la paco.”

Por atingi tion, ni nepre bezonas la helpon kaj subtenon de ĉiu Esperantisto-Pacifisto. Ligo sur papero ne efikas.

Se ni ne akiros la bezonatan kunlaboron en multaj landoj, tiam estos neeble, daŭrigi nian laboron.

De la rezultato de ĉi tiu alvoko dependos, ĉu nia Ligo havas ekzistrajton.

Al vi, Esperantistoj-Samideanoj, la decido!
por: U.E.P.L. Julia Isbrucker,
Prezidantino.
Oostduinlaan 32, HAGO (Holando).

ESPERANTO AND WIRELESS.

Yet another German station, that of Langenfeld in the Rhineland, broadcast a program in German and Esperanto on 29 January last. The Kovno Station (Lithuania) commenced an Esperanto course on 2 February. The WPCB Station in New York broadcasts in English and Esperanto every Wednesday.

The Sremska Station, following the example of other Siberian stations, has for some time past pursued a similar course.

—I.E.S.

ESPERANTO IN THE NEAR EAST.

Persia.

The number of Esperantists in Persia is continually increasing. A more intensive propaganda is at present in preparation. There are already two excellent grammars in Persian. An “Esperanto Key” in the form of a small pamphlet weighing no more than 10 grams, and containing a complete grammar, the fundamental vocabulary and a list of commercial words in common use, will shortly appear.

The Universal Esperanto Association has delegates at Teheran, Tabriz, Ispahan, Sultanabad, Resht and Kermanshah.

—I.E.S.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunveno: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe “Rawson Chambers,” Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George’s River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Cole’s Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

“THE RAINBOW,” Cole’s Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.